



Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 1, Januaro, 2008



Dum la novembra kunsido oni elektis (fakre, reelektis) la gvidorganon de nia E-societo. Tio estis unusola propono, unuanime subtenana per ĉiuj ĉeestintoj. Unu el la plej gravaj atingoj de la Societo estas regula ĉiu-monata apero de la bulteno "Saluton!". Estis starigitaj bonaj rilatoj kun ankoraŭ kelkaj E-kolektivoj de ŝikagaj partner-urboj, estis renovigita kaj konstante refreŝata informo kaj formo de nia retejo (dank'al kasisto K. Gunn). Junie ni denove organizis piknikon en la domo de Roberto kaj Sepideh, espereble, ĝi estos tradicia aranĝo. Kiel kutime, sukcesis Zamenhofa bankedo en ĉina bufedo, ne tiel multnobra (vidu la foton), kiel pasintjare, sed interese prelegis s-ino Elena (Germanio, ŝi prelegos ankaŭ januare). Sed mankas kursoj de IL, oni ne tre vigle propagandas E-on, pro tio ne aperas "novaj vizaĝoj" en nia E-grupo. Jen estas nova direkto en nia estonta agado. Kaj nun la redakcio elkore salutas ĉiun okaze de

Nova 2008 jaro, sanon kaj sukcesojn!

Novjaraj salutoj!

Pasintnovjaraj abioj forbrulis
en la stampedo de l' tempa rutin'.
Dekdu monatojn horloĝ' forkalkulis
kaj altiktakis al nova jarfin'.
Kaj renaskiĝas fenikse en stratoj
odoro tenta de la konifer',
kaj festaj datoj, jam tre atendataj,
t riumfe paŝas de nun laŭ la Ter'.

Do en la neĝa rusia provinco
mi ŝaltu lumojn sur mia abi' –
kaj vi ekvidos, ke brilas tra l' vintro
la bondeziroj plej koraj por vi.
Mikaelo Bruna Ŝtono

2008 – Jaro de Lingvoj

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto. S-ro Koichiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, publikigis mesaĝon pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. En ĝi li skizas la ĉefajn idealojn kaj celojn de tiu speciala jaro, al kiu estos dediĉita ankaŭ la temo de la 93-a UK de Esperanto en Roterdamo en 2008. La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj.

Vinilkosmo-novaĵoj

Jacques Yvart, pioniro, inaŭguros per sia disko la Vinilkosman jaron de 2008! Repo, regeo kaj eĉ gotika metalo certigas siajn kapablon rompi lingvajn barojn nun jam ankaŭ en nia muziko, kaj certe nemalsukcese brilos en Esperantio. Aperis nun du novaj KD-oj, kiujn vi espereble metis sub vian kristnaskan abion. Ĉiuj troveblas en la hejmpaĝo de Vinilkosmo.com, kaj ankaŭ du novaj videoj tie aĉeteblas kaj spektendas!

En Strasburgo sonas Esperanto

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sendependa Haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, oni proponis al la Haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto. Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe 5 tegmentaj boatoj kaj la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia sonsistemo. E-o nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito.

Nin salutis:

- Kara Viktor, mi reciproke bondeziras al vi, al la ŝikagaj esperantistoj kaj al ĉiuj ricevantoj! h - Amike, Renato Corsetti, prezidinto de UEA
- Karaj ŝikagaj gesamideanoj, en la nomo de la tuta Milana Klubo oni elkore dankas vin pro viaj salutoj kaj bondeziroj, kiujn oni reciprokas.
- Amike, Ermigi Rodari, sekretario
- Karaj gesamideanoj el la ĝemela urbo, ni ankauh festis Zamenhofan tagon la 17-an de decembro (kiam ni havas kutiman lundan kunvenon), sed ni tiel bone pasigis la tempon, ke ni simple forgesis fari fotojn.
- Adem Jakupoviĉ, prezidantaro de la (Beograda) societo
- Karaj Amikoj, Vi havu bonan jaron en 2008 kaj ankaŭ post tio.
- Bondezirojn al vi, Ron k Audrey Glossop

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

